

Esperanto-Brno

Ĉu samseksuloj - gejoj plaĉas al Dio?

Zdeněk Závodný

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, 10-an de septembro 2014

En la pasinta jaro 2013 nian socion skuegis okazaĵo, ke nia prezidento Miloš Zeman rifuzis subskribi profesoran dekreton por docento Martin C. Putna, kun argumento, ke li subtenas gejojn.

Liberaluloj kaj progresemluloj koleregis pro tiu decido, konservativuloj ĝojis. Mi, laŭ mia konfeso, estas romia katoliko, do mi estas nek liberalulo nek progresemlulo, pro tio min ne indignigis la decido de nia prezidento. Sed tiu decido disdividis nian socion. Temas ja pri la debato pri homa sekseco, temo ege tikla, ĉar ĝi tuŝas moralecon, personan identecon, emociojn kaj homan rajton.

Mi kiel kristano ĉiam samseksema konduto kondamnis kiel iuspeca abomenaĵo. Sed ĉar mi ne estas konservativulo fundamentisto, mi decidis iom pli detale konatiĝi kun diversaj opinioj pri tiu tikla demando.

Estas konate, ke en helena kaj romia socioj samseksema konduto estis tolerata, sed pro la influo de kristanismo sur okcidentan kulturon samsekseco iĝis konsiderata io malnatura kaj eĉ psikologoj konsideris samseksecon psika malsano. Ŝanĝo okazis fine de la 20-a jarcento pro evoluoj en psikologio kaj sociaj progresoj, virinaj rajtoj kaj seksa emancipiĝo.

Sed kion diras Dio pri tiu fenomeno? Tion ni devas serĉi en Bibliio, en kiu Dio starigis klarajn eternajn leĝojn, kiuj aplikas al ĉiu. Ŝajne laŭ ili samseksema konduto estas ĉiam peko, senkonsidere la cirkonŝtancojn, kiel libervole elektita vivstilo ne kiel denaska aŭ deinfanaĝa inklino.

Liberalaj aŭ progresemluloj kristanoj kutime konsideras Bibliion esence homa verko, verkita sub dia inspiro. Tio signifas, ke kvankam la spirito de la Biblio esprimas diajn verojn, la historiaj detaloj kaj vortvorta signifo de la tekstoj ne ĉiam fidindas. La verkintoj estis ja finfine produktoj de siaj epokoj kaj kulturoj, kaj ne simple skribiloj en la mano de Dio. Do laŭ liberalaj kristanoj samseksema konduto ne estas peka per si mem, sed kiel ĉia seksa konduto dependas de la koncerna rilato. Do, seksa rilato ene de reciproke ama, monogamia samseksema paro estas same morala, kiel seksa rilato ene de monogamia aliseksema, dum hazarda aŭ perforta seksumo estas malmorala en ĉiuj kazoj. Krome, liberaluloj emas konsideri samseksemon ne io memelektita, sed io decidita de genetiko aŭ produkto de fruaj infanaj spertoj.

Fundamentistoj kaj konservativuloj ofte argumentas per la verso el la Mosea Leĝaro (Levidoj 18:22), kiu diras "Kaj kun virseksulo ne kuŝu, kiel oni kuŝas kun virino, tio estas abomenaĵo" Tiu Mosea leĝaro en la Torao enhavas 613 ordonojn, donitajn de Dio al Moseo, el kiuj 365 estas malpermesoj. La Leĝaro malpermesas i.a.

koiton kun menstruanta virino, razadon aŭ hartondadon, portadon de vestaĵoj faritaj el kunmiksita ŝtofo, manĝadon de porkaĵo kaj aliaj nekoŝeraj manĝaĵoj. Krome troviĝas ordonoj, ke tiuj, kiuj misuzas la nomon de Dio kaj infanoj, kiuj malbenas gepatrojn ESTU MORTIGITAJ.

Evidente, modernaj kristanoj, eĉ ekstremaj fundamentistoj kaj konservativuloj ignoras la grandan plejmulton de la Mosea Leĝaro, sed oni obstine observas specife ĉi tiun malpermeson. Sed eĉ akcepti la validecon de la verso mem, ĝi tamen estas certa kondamno de "GEJECO" laŭ la moderna difino.

En la Leĝaro oni difinas du specojn de pekoj - MORALA PEKO kaj RITA MALPURECO. Morala peko indikas ian ribelon kontraŭ absoluta dia leĝo, dum la rita malpureco indikas ian malobservon de la juda ceremonia leĝaro (t.e. ritoj kaj kutimoj, kiu distingas la hebrean popolon disde aliaj). Jen klaraj ekzemploj: MURDO = MORALA PEKO; manĝado de porkaĵo = RITA MALPURECO. Do pri kiu speco oni parolas en la menciita verso, tio certe debateblas. La vorto "ABOMENAĴO" pli precize indikas "RITAN MALPURECON" kaj tiu regulo koncernas nur la hebrean popolon. Krome, multaj leĝoj en la Mosea Leĝaro rilatas al la malpermeso de PAGANAJ RELIGIAJ PRAKTIKOJ, tre verŝajnas, ke ĉi tiu verso celas specife samseksajn paganajn templajn seksritojn (kutimaj en tiamaj paganaj religioj). Ĉiukaze, ĝi evidente ne prikomentas seksajn rilatojn ene de monogamia geja paro (afero, kiu simple ne ekzistis en tiu socio).

Sed mi ne estas judo, por mi validas BIBLIAJ ARGUMENTOJ - NOVA TESTAMENTO

La veno de Kristo alportis novan revelacion, t.e. NOVAN TESTAMENTON. La plej ofte citataj versoj, rilataj al samsekseco, estas tiuj de la Apostolo Paŭlo: *"Tial Dio fordonis ilin al malhonoraj pasioj, ĉar iliaj virinoj ŝanĝis la naturan uzadon en kontraŭnaturan; kaj tiel same ankaŭ la viroj, forlasante la naturan uzadon de la virino, brulis en sia volupto unu al la alia, kaj viroj kun viroj faris hontindaĵon kaj ricevis en si mem la taŭgan rekompencan de sia malvirto."* /Romanoj 1:26-27/.

Sankta Paŭlo naskiĝis en la jaro 5-10 post Jesuo Kristo en la komunumo Tarsus en pasejo de azia montaro Taurus (en sudorienta parto de nuntempa Turkio). Diference de sankta Petro, li persone ne renkontis Jesuon Kriston kaj ankaŭ ne apartenis al grupo de 12 apostoloj. Lia aktiveco de misiisto okazis dum liaj grandaj vojaĝoj en la jaroj 45-50 kiam li vizitis Cipron, Malgrandan Azion, Makedonion, Grekion. Pro sia kristana aktivado li fariĝis viktimo de persekutado flanke de imperiestro Nero kaj mortis en Romo cca. en la jaro 67.

Sed nun al tiu antaŭe nomata verso. Sankta Paŭlo pritraktis diversajn sociajn temojn. Ekzemple li konsideris sklavecon tute normala kaj instruis, ke virinoj silentu en preĝejo, humile obeu sian edzon, kaj ne portu oron aŭ aliajn ornamaĵojn. Modernaj kristanoj ĝenerale ne obeas ĉi tiujn instruojn - do kial obei unu instruon de Paŭlo, sed aliajn ne? Aperas multaj kialoj ne kompreni la tekston kiel kondamnon de geja vivstilo laŭ la moderna difino. La ĉefa kialo estas, ke Paŭlo mencias ŜANĜON de la natura uzado en kontraŭnaturan. Tio signifas, ke temas ne pri homoj, kiuj denaske aŭ dejunaĝe havas konstantan inklinon al la sama sekso, ĉar por ili inklini al la sama sekso estas NATURA. La verso validas por aliseksmaj homoj, kiuj ĉu pro distro aŭ, plej verŝajne, pro partopreno en paganaj seksritoj faras samseksajn agojn.

Alia ne-biblia argumento estas NATURA LEĜO

Al la bibliaj argumentoj la Rom-katolika Eklezio aldonas la argumenton de "NATURA LEĜO", kiu estis plej detale formulita de Sankta Tomaso de Akvino, la granda mezepoka filozofo-teologo kaj unu el la doktoroj de la Rom-katolika Eklezio. La natur-leĝa argumento celas pruvi, ke la dogmojn de la Eklezio subtenas ne nur dia revelacio, sed eĉ "NATURO" mem, t.e. ke la doktrinoj kaj morala instruo de la Eklezio estas raciaj. La natur-leĝa argumento kontraŭ samseksema konduto baziĝas sur ĝenerala teorio pri celo de seksumo entute. Do, "NATURO" instruas, ke la celoj de homaj seksaj rilatoj estas jenaj: 1/ GENERADO de INFANOJ! 2/ UNUIĜO de GEEDZA PARO; 3/ PLEZURO. Sed ne sufiĉas, ke nur unu el la kondiĉoj estu plenumitaj, sed ĈIUJ TRI SAMTEMPE. Do, naturo koincidas kun rom-katolika doktrino, ĉar laŭ tiuj kondiĉoj la sola permesebla seksado estas nur koito (senkondome) inter geedzoj. Sekve alispeca seksa konduto inter geedzoj, koito inter negeedziĝintaj viro kaj virino, samseksema seksumado, KOITO KUN KONDOMO, kaj masturbado, ĉiuj estas kontraŭ la Naturo, kaj sekve kontraŭ Dio. Multaj kritikoj argumentas, ke neniel klaras, kial seksa ago devas plenumi ĉiujn tri kondiĉojn samtempe.

Tiu natura leĝo devenas nun absurda, konsiderante la trorapidan loĝantarkreskadon en iuj malriĉaj landoj kaj kreskanta aidoso-malsano sekve de politiko de Rom-katolika Eklezio kontraŭ UZADO de KONDOMOJ.

Ĝis nun mi vidis diversajn citaĵojn kaj argumentojn kontraŭ samsekseco. Sed mi vidis neniun vorton, citaĵon de la centra persono de kristanismo, Jesuo Kristo mem. Kial? Ĉar en kvar Evangelioj Jesuo silentas pri la tuta demando de samsekseco. Se, samsekseco estas tiel granda abomenaĵo antaŭ Dio, kial Jesuo eĉ ne unufoje mencias ĝin?

Se silentas Jesuo Kristo, kion diras la estro de Rom-katolika Eklezio? Papo Francisko parolante pri la gejo, kiu serĉas vojon al Dio, demandis: "KAJ KIU ESTAS MI POR JUĜI LIN?" Eble jam alvenis la tempo, ke konservativaj - fundamentismaj kristanoj ĉesu uzi religion por subpremi, diskriminacii kaj emocie suferigi jam delonge persekutatan homgrupon, kaj anstataŭe finfine ellernu kaj ekpraktiku la vorton de Jesuo: "AMU VIAN PROKSIMULON KIEL VIN MEM".

Kiel batalas por siaj rajtoj la samseksuloj en ĉeĥa Respubliko? Ĉiu-jare en Prago okazas Festivalo de Fiereco (Prague Pride). Nunjare (2014) sabate la 16-an de aŭgusto marŝis pli ol 15.000 gejoj, lesboj, biseksuloj kaj trans-seksuloj tra la centra Venceslao-placo. La marŝo atentigadis je diskriminado de samseksuloj en 76 landoj de la mondo kaj danĝero de aidosa viruso. Polico haltigis 15 kontraŭuloj de samseksuloj, kiuj protestis perforte kontraŭ la marŝo.

Kion faras niaj leĝdonantaj institucioj? La Leĝo pri registrita partnereco estas la unua paŝo sur vojo al jura solvo de samsekseco en la Ĉeĥa Respubliko. En la jaro 2006, post longa traktado kaj multaj kompromisoj, nia parlamento aprobis la Leĝon pri registrita partnereco kun reduktitaj rajtoj, kompare de geedzaj rajtoj. Bedaŭrinde malgranda grupo de konservativaj deputitoj, kiuj sin prezentis kiel katolikoj, sukcesis aldoni al tiu Leĝo la frazon "La registrita partnereco malebligas tion, ke iu el registritaj partneroj adoptu infanon". Do tiu frazo, kiu malpermesas al personoj en la registrita partnereco pretendi ĉe kortumo permeson adopti infanon,

estas klara diskriminacio laŭ senco de kontraŭ-diskriminacia leĝo akceptita en la jaro 2009 en Ĉeĥa Respubliko, en harmonio kun rekomendo de EU - Eŭropa Komisiono kaj Konsilio de Eŭropo. Nun feliĉe ekzistas espero, ke la Konstitucia Kortumo ĉi tiun diskriminadan frazon abolicos.

Mi nun, konatiĝinte iomete kun variaj argumentoj, juĝas samseksuloj laŭ la Dia vorto: "Amu vian proksimulon kiel vin mem". Mi dankas por via atentemo!

(Rimarko: Bibliajn argumentojn publikis s-ro Joel AMIS en Kontakto numero 201 (2004:3).